

alia restas viva kaj interpretanta. Ni estas konsistige misteraj unu al la alia. Sen la kombino de la nefinieco de la interpretado kaj la emfaza finieco, mortemeco, de la interpretantaj faktanoj, ni ne havus la fakton de la amo, sur kiu, ĝis la fino de la tempo kaj poezio, restos bazitaj la revoj pri la hejmo, en kiu la faktaneco loĝas kaj la faktereoj estas sciataj kaj reinterpreteblaj.

En la hejmo, ĉiu hejmano estas luno rebrilanta pro la brilo de la alia, ni lernas ĉe Camacho, kaj neniu el ili sin provas establi sune mastra en sia hejmo. Jen poetiko de serioze pripensita egaleco, kiu devas eki en la hejmo mem. Se reveni al la ibera skolo, Abel Montagut prezentas en sia *Poemo de Utnoa* alipejzaĝan, frape atentindan modelon de egaleco inter la viroj kaj virinoj. La fakto, ke la poeta konstruo de Jorge Camacho trafas paralelan klavon, kreas tian orkestron, kian neniu antaŭe aŭskultis, kaj pro kiu devas senti sin danka ĉiuskola komentarianto pri tiuj versoj.

Ricardo Felipe Albert Reyna

Protea poemaro

La fontoj nevideblaj, de Baldur Ragnarsson, eld. Mondial, Novjorko, 2010, 127 p., ISBN 9781595691743.

Unua provo, kvazaŭ ebria

Kiam mi akceptis la proponon, ke mi recenzu ĉi tiun poemaron, unu el miaj amikoj komentis al mi, ke li ne kuraĝus recenzi verkon de tia giganto, kia estas Baldur Ragnarsson. Mi memoras, ke mi pensis: *Nu, finfine, nur la Fundamento estas netuŝebla. Do kial mi ne risku kontroli la fendojn de unu el niaj idoloj? Mi pretas fariĝi martiro de recenzistiko, kiu, bone pripensite, estas nur parazita arto aŭ tekniko; do ĝi meritu cedi antaŭenpaŝon al pli nobla okupo, kia estas poezio. Tio estis, pli-malpli, miaj apenaŭ skizitaj pensoj. En la unuaj semajnoj mi defiis la maron da poemoj apenaŭ flosante, ĝis mi rimarkis, ke mi drivas en senborda oceano. Kaj mi komencis timi, ke mi envenis labirinton sen elirejo. En la tropiko de mia recenza periplo mi malsaniĝis je recenza*



febros, pro kiu mi jen troviĝis en stato de verko-lakso – abundaj notoj makulis ĉiun disponeblan paperon laŭlonge de la senfinaj tagoj –, jen mia kolapso provokis tian inko-konstipon, ke nura ekpenso pri papero kaj kraĵono garantiis mian senkonsilan kuŝadon for de ĉiu verkebleco. Kaj tiel pasis semajnoj kaj monatoj kaj monatoj... Mi jam timis, ke la bonvola redaktoro, kiu mendis la recenzon, ne plu fidus mian disponeblon, sed forviŝos min el la listo de pretpretaj recenzantoj. Tamen la ilumino alvenas, kiam la homo jam perdis ĉian esperon pri saviĝo kaj, post elĉerpo de ĉiuj rimedoj, neatendita anĝelo komunikas formulon, al kiu sola povas kroĉiĝi la senespera preĝo al la Muzoj. Kaj mi decidis nur ektaĵpi la tekston, kiu venos el miaj fingroj, kaj kiun vi legas sur ĉi tiuj paĝoj.

Mi memoras, ke en la komenco mi volis sekvi mi ne plu memoras kies recepton de poema analizo, laŭ kiu mi unue legu serĉante ritmojn, akcentojn, efikajn paŭzojn, por transiri poste al konkretoj: sensaj bildoj, komparoj, kontrastoj... Tio ebligu al mi rekonu la kernon: motivon, movforton. Jen la ponto al la subjektiva enhavo: kunligaj kunsignifoj, emocio, simboloj, ideoj. Aludoj kaj strukturo estus arbaro tiel implikita, ke mi jam ne scius eĉ kion diri. Eble pri la lingvouzo mi povus fari komparon kun ordinara lingvaĵo, aŭ eble suflori, ĉu ĝi estas kompakta aŭ difuza, ekzemple. Aŭ mi povus limigi mian studon al sonaj efikoj: kiu estas la rilato inter la sencoj, unuflanke, kaj aliflanke la ritmoj, la rimoj, la aliteracio... En tiu punkto de mia recenza vojo ne plu estis penso eĉ pri temo aŭ ĉefideo, kiel ajn abstrakte vortumita mi farus ĝin. Do mi relegis la verkon kaj provis alian vojon.

Dua provo, labirinta

Mia dua provo ne estis pli sukcesa ol la unua. Mi, kiu troviĝas proksimume je la vojmezo de mia vivo tera (tio nomiĝas optimismo!), jam forgesinta la lacigan vivabundon de la kaloĉaja abituriento, kaj ĉiam pli facile rekonanta la vivolacon de nia islanda poeto, perdis mian vojon veran en la arbareg' kreskinta el ĉi fontoj nevideblaj. Mi volis studi funde, detale, la arton de la poeto. Mi volis studi liajn sintaksajn transformojn, liajn sukcesajn paralelismojn, liajn metaforajn disvolvojn, liajn pozitivajn deviojn disde tiaj normoj, kiuj havas bazon aŭ en la ordinara lingvouzo aŭ en fiksjaj poetikaj formoj. Rea deliro mia en aroganta desuprismo lega.

Sed finfine mi ne konas la homon Baldur Ragnarsson, nur la poeton mi aŭdas kaj lian voĉon mi aŭskultas en liaj poemoj, kvazaŭ orefenestroj, tra kiuj mi vidas lian poezian mondon loĝatan de propraj entoj kaj reguloj. Kaj tiun poeton mi konas en diversaj aĝoj.

Ŝtupoj sen nomo (1955-59) estas liaj unuaj paŝoj infanaj. *Esploroj* (1960-73) plenplenis je junulimpeto sciavida. *Aldonaj poemoj* (1955-2007) montras grizan monotonecon de plenkreskula vivo, kun ties pintoj kaj malpintoj. *La neceso akceptebla* (2008) ekkonscias pri neeviteblaj kadukiĝo kaj finalo. Kaj *La fontoj nevideblaj* (2010) retrorigardas al la komenco kvazaŭ transsalto preter la morto. Kie estis la eraro? Ĉu ne eblis esplori alian, senfinan vojon? Ĉu la ŝtupoj ne havis nomon, ĉar ili ne havis signifon, ne havis sencon, ne havis celon? Sed tio estas komentoj de ekstersistanto. Tamen tio estis poemaro de *Ho mia kor', por kio nia nasko?* kaj de *moko moko mok / sen fino*. Kien do la ŝtupoj? Ankaŭ la dua poemaro aludas tiun, kiu *legis verson / kun mikso de bonvol' kaj malestimo, / fremdulo antaŭ iama vorto kara*, tiel kara kiel la sonĝo de amo sur la vivovojo de *Odo al mia edzino*, kiuj komence kaj fine asonancas kaj rimiĝas kun tiu Odino de la *Aldonaj poemoj*, tiu dio mem de poezio, kies lingvaĵon malfacile komprenas eĉ *la grup' de l' aspirantoj*. Kion esperi jam de tia kadukulo?

La poeto prezentas siajn poemojn kiel vojon al sciado, kaj do ĉiun poemon kiel etapon sur tiu vojo. Se poezio estas esplorado de nekonata, tamen jam ekzistanta realo, ĝi estas do vivovojo, roĝo, kiu fontas el diversaj (videblaj kaj nevideblaj) fontoj, trakuras diversajn pejzaĝojn (la tri unuajn poemarojn) kaj jen alvenas al la maro (la neceso, ĉu akceptebla?), jen provas reveni al nevideblaj fontoj, ĉu kvazaŭ renaskiĝe, ĉu kvazaŭ reesplore je vivovojo, neripetebla ĉar tiu realo estas jam definitiva: la inko jam sekiĝis kaj la plumo jam leviĝis... kaj la verko estas preta por la *tago de lasta juĝo*.

Sed poezio estas ankaŭ konstruado de mondo, kaj ĉiu poemo estas aspekto de tiu mondo. Se la poemoj havus daton, tiu estus unu el la tagoj de la genezo de universo. Kaj estis poeto, kaj estis leganto, la oka tago. Eble tial Odino, la dio de poezio, estas ankaŭ la supera dio, se mi atentigo pri iama prava rimarkigo tiutema de Mauro Nervi.

Tria provo, dezerta

En mia vagado mi ne plu sciis kion diri pri la rilatoj inter lia antaŭa poezio kaj lia nuna poezio, inter lia prozo kaj lia poezio: ĉu ideo, ĉu emocio, ĉu nur forme... Kia rilato estas inter lia poezio kaj aliaj poezioj? Kiaj rimedoj peras kiujn emociojn? Sed mia roĝo (ĉu mia koro?) sekiĝis dum miaj provoj sekvi la fluon de nia poeto, kaj mi trovis nenion por komuniki.

Se poemo estas esploro, ĉiu nova verko de Baldur Ragnarsson estas nova vojaĝo. Se poemo estas maniero kapti disfluantan senton, ĉiu nova verko de Baldur Ragnarsson estas preĝo celanta savi liajn sentojn

fiksante ilin en spaco kaj tempo. La ne plu religia modernulo tamen ne povas tute seniĝi je tradicio. Li volas savi sian memon, siajn sentojn, antaŭ la tragedio, ke la ekstera mondo estas kaj restas indiferenta, kiam li ne rigardas. Nur kiam li rigardas, li estas parto de la mondo; de tiu mondo, kiu restas fiksita en ŝajne senmovaj tempo kaj spaco, en liberpreĝaj poemoj de komunio ambaŭflanke de homaj sentoj kaj de privivataj pejzaĝoj, de empatiaj¹ kunrolantoj en la prodaĵo de homa vivo. Nia poeto heroo peripetias en sia periplo kaj revenas al ni kun ŝamanaj eldiroj, kies signifojn ni interpretas kaj hipotezas.

Li kreas ekzistadisman antimondon, en kiu li liberiĝas de la poezia tradicio per inversigo de formoj, precipe rilate al strikte metrikaj formoj kaj rimado, por eltrovi novajn vojojn en naturaj kaj emociaj priskriboj, tamen sur firma fundamento de multaj antaŭaj poetoj kaj ne-poetoj.

Sed mi estas viktimo de pedagogio, kiu rifuzis gvidi la lernantojn per jamaj modeloj, sed nur defendis la liberan kreemon de ĉiu individuo. La priplorinda rezulto estas, ke mia generacio tute ne suspektas la ekziston de intelekta tradicio en ĉiuj kampoj de arto kaj scienco; pro kio nia produktado estas, en la plej feliĉaj okazoj, naiva *reinventado de la rado*.

Baldur Ragnarsson, male, apartenas al pli frua generacio (tiu de mia patro), kiun oni metis sur la Prokustan liton de klasikaj reguloj sufokantaj individuajn kreemojn. Tio klarigas lian emon al libero en arto; tiu sama libero, kiu montriĝis sterila ĉe aliaj homoj, kiam ĝi malhavis la informan forton de artaj tradicioj ne plu konataj.

Tamen mi ankoraŭ ne komencis paroli pri ĉi tiu poemaro...

Kvara provo, intelekta

Nia poeto estas partiano de intelekta poezio. Tion li prozas teorie kaj tion li versas praktike. Sed pri kia intelekta poezio temas? Ĉu sufiĉas karakterizi ĝin per tio, ke oni povus traduki ĝin ajna-lingven? (Sed Jorge Camacho jam verdiktis, ke poezio estas ĝuste tio, kion oni povas traduki.) Ĉu liaj abundaj notoj diras ion al ni pri ĉi tio? Kiel artikolisto kaj eseisto li elĉerpas siajn temojn per serena stilo (preskaŭ teknika) sen elŝprucoj de sentoj. En *La lingvo serena* ni jam povis relegi multajn liajn elplumaĵojn pri esperanta literaturo (originala kaj tradukita), pri literatura teorio, pri islandaj temoj, eĉ membiografiajn. La tuto havis komunan fadenon: literaturon, traktitan kun lingva sentemo. Sed, mi ripetas: pri kia intelekta poezio temas?

1 **empatio**: kunsentemo (*Reta Vortaro*); intelekta kaj afekcia identiĝo de subjekto kun la animstato de alia subjekto (*BA15*, oktobro 2012, p. 97).

Al la mito de la racia lingvo li apudmetas miton de racia poezio, en kiu la signifo superregus la emocian kaj materian flankojn. Kiom ajn alloga mi trovas lian teorion starpunkton, mi tre dubas pri la praktika ebleco de tia intelekta poezio super la romantikismo favorata de tiel multaj legantoj kaj la *allunaj grilĉirpoj* de la vortmuzikistoj².

Mi provu Sizife rekomenci la recenzon rememorante, ke en Esperantujo estas vaste konata klasifiko de diversaj literaturaj ondoj. Unua ondo estis romantikismo. Dua ondo estis klasikismo, indiĝene nomata *parnasismo*. Tria ondo estis modernismo. Ĉu ekzistas kvara, postmoderna, ondo? Kiel kongruus tiu teorio de ondoj kun la ondo de klasikismo en la islanda literaturo post la Dua Mondmilito, kiu nepre devis influu nian poeton, naskiĝintan en 1930? Ĉu mi kapablus almenaŭ klasi la poeton inter la ondojn? Mi dubas.

Kvina provo, digresia

Mi jam tute perdis mian vojon al la poemaro. Inter la polusaj tentoj de revolucia detruemo kaj paternalisma konstruemo estas facile cedi al senkomprena psitakismo aŭ al sterila eĥolalio. Sed mi volas aliri la poemaron takse kaj analize: mi volas analizi la poemojn, eĉ la poemerojn, kaj taksi la tuton, dise kaj kune, ne el vidpunkto de eventuala originaleco (malgraŭ la nepra ĉeesto de novo en ĉiu artverko valora el modernisma vidpunkto), sed el vidpunkto de retrovo aŭ rekonstruo de antimondo propra al la poeto.

Por eĉ pli kompliki la aferon, mi ŝatas pamfletojn kaj panegirojn, kaj mia empatiemo malfaciligas enmeton de vortoj kritikaj. Ĉi tiaj, kiam ĉeestaj, ŝuldas sian entrudiĝon al konscia volforto por ne tro malplaĉi al kritikemuloj; ĉar, finfine, ankaŭ ĉi tiuj havas vundeblan koron, kiun mi ŝatus varti, ĝis ili kreskos kaj ampleksos aliulajn sentojn.

En *Anstataŭ prologo* de la poemaro la teoriisto konfesas, ke la poemoj baziĝas *sur junaĝaj memoroj, historiaj aludoj, filozofiaj konsideroj*

2 Mi aludas parton de la poemo *Memporetro*, de Antonio Machado (1875-1939), klasika lirikisto hispana, en traduko de Fernando de Diego (*Sentempa simfonio. Poem-antologio hispana*. Madrid, 1987):

*Naŭzegas min arioj bombastaj de tenoroj
- nu, la koruso grila la lunon ne alzumu! -
La voĉojn mi distingas el tonoj sen sonoroj
kaj tre atente aŭdas, inter la voĉoj, unu.*

En la originalo:

*Desdeño las romanzas de los tenores huecos
y el coro de los grillos que cantan a la luna.
A distinguir me paro las voces de los ecos,
y escucho solamente, entre las voces, una.*

kaj legendecaj fantazioj, (...) tamen ofte kun komunhomaj aŭ aktualaj subsignifoj; dum forme ili estas diversaj, depende de la bezonoj de la temoj, kun rimoj aŭ sen rimoj, regul-ritmaj aŭ liber-oersaj. Do, pli-malpli rekta daŭrigo de (...) **La neceso akceptebla**. Kion mi povus aldoni post tiel trafa diagnozo?

Nu, la versoj estas kompaktaj frazoj kaj frazeroj, ke mi kvazaŭ sentas la fridon, en kiu ili loĝas, kaj pro kiu ili tiel kunpremiĝis, ke la fuĝema varmo restu ankoraŭ momenteton, antaŭ ol la poemo glaciĝos poreterne.

Same, la poeto trablovas sian inspiron al ni en tiuj vortoj, kiuj riskas fali survoje. Nur la pulsanta koro en lia parolo tenas la poemojn vivantaj preter la vakuo, kiun li sukcesas traarki pensrapide.

Lia verkaro neniam estos kompleta, ĉar li ne akceptas finojn: li ne akceptas nur klasikan poezion, li ne akceptas ekskluzivajn modelojn, li ne akceptas fermitan repertuaron; ĉar ĉiu nova vivo estas unika kaj donas novan sencon al ĉiam nova mondo. Tial li ne faras finitajn poemojn, sed disvolvas sian memon poezie. Li estas dinamika poeto de la ĉiam nova vivo, ne statika versisto flustranta, pardonu, mi celis: ilustranta eternajn modelojn, formojn, ideojn, principojn.

Mi povas fini apenaŭ per plia kaj plua digresio ĉirkaŭ poemaro, kiun mi povas nur omaĝi, neniel profani per biopsia dissekcado, kiu neniam povus redoni la originalon. Do mi nur komentu pri la maro, kvankam tiu vorto signifas por mi la interteran maron de Mediteraneo, ne la maregan oceanon de Atlantiko kun ondomontoj apenaŭ imageblaj.

Aliajn homojn eble impresos la maro de Baldur Ragnarsson; ne min, kiu naskiĝis kaj kreskis ĉe la bordo de maro, kun kiu mi edukiĝis dialoge, kaj trans kiu mi intuis realan mondon, el kies lingvoj mi eklernis kelkajn kvazaŭ por konvinkiĝi, ke tiu mita, transmara mondo, nur pene distingebla el la pintoj de miaj ĉe-maraj montoj, vere ekzistas.

Nun, mi loĝas en la centro de duoninsulo, je plurcentkilometra distanco de la maro, ĉu norden, ĉu suden, ĉu orienten, ĉu okcidenten, inter homoj, kiuj nervoziĝas apud mia trankviliga maro (mi kutimis promeni ĉiutage sur la sablo, apud la ondoj; foje sidadis por aŭskulti mian amikon, la maron³).

Kaj finfine mi alvenis al certeco, nome, ke mi ne povas recenzi ĉi tiun poemaron; ĉar ĉiu legado transdonas novan verkon, ĉar la verkon rekreas la leganto, tiu *fremdulo antaŭ iama vorto kara*. Jen mia

3 Aludo al kanto *El meu amic, el mar*, de la kataluna kantisto kaj komponisto Lluís Llach (1948), kiu tre influis min siatempe malgraŭ tio, ke mi neniam loĝis en la Kataluna Landaro.

kritika reago al la strikta certeco de temoj kaj formoj, de poemoj kaj notoj, kiun ŝajnigas la poeto. Ĉar dirita vorto ne plu apartenas al la dirinto, sed al ĉiu aŭskultanto. Kaj el la poemoj de Baldur Ragnarsson mi rekreis ĉi tiun recenzon, per kiu mi provis ne mortigi vivoplenan parolon; mortiga estus mia ŝajnigo, ke la komentoj povas anstataŭi vian poezian konversacion kun li. Kion do vi rekreos, kiam vi legos ĉi tiun Protean poemaron?

Definitiva, neeble sobra versio

Kaj jen paŝas mia lasta provo ĉerpi nektaron el la ambrozio de ĉi poemaro, kiun mi navigas kvazaŭ poemmaron. Ili, la poemoj, ŝprucas el nevideblaj fontoj. Ne plu temas pri la klaraj fontoj de la Kalocsay'a verstekniko, kun fride tranĉaj eĝoj de preskaŭ logikaj poemoj. Ne plu temas pri la objektivaj vortumebla, ĉiutaga grizrealo. Ne plu temas pri la vitrino de la klasika butikoj. La fontoj nevideblaj estas tiu vivoforto, kiu fluas kaj pluas el sentoplena koro, al kies ritmo ni povas aliĝi, ĉar ĝi batas kaj rebatas atestante pri sia ĉirkaŭaĵo.

Tamen la fontoj nevideblaj ne estas Islando, nek iu ajn alia eksterliteratura mondo. Ĉar tio, kion ni lernas pri iu ajn mondo, estas komuna konstruaĵo de la verkinto kaj la leganto. Kaj do via rekonstruado de ĉi tiu literatura provinco eble malsimilos mian rekonstruon. Tial miaj pripensoj eble nenion diros al vi, se vi ne kundividus la mondon, el kiu mi rigardas.

De la komencaj poemoj de *Ŝtupoj sen nomo*, kun perfekta rego de parnasisma verstekniko, ĝis la nuna prozo, kiun sentema leganto rimarkos kiel poezion, estis longa vojo de mallernado. Baldur Ragnarsson bezonis longan verkovoĵon da multegaj poemoj, ĝis li mallernis sian teknikon kaj ekparolis kun tia spontano, en kiu la poezia sento altrudas poemecon sendependan de truko kaj artifikoj. Li bezonis multe da poemoj, ĝis li proponis ne plu brilajn fajrartaĵojn de juna impeto, sed maturan alparolon de homo, kies ĉiun vorton akompanas sincera eleganto. Tiu ŝajna prozo en formo de distranĉitaj linioj seniĝis je ĉiu superflua rimo, ritmo, asonanco, kiuj tamen jen montriĝas, jen momente malĉeestas, ŝajne en ĉiama provado diri ion, kion ni ne atendas, laŭ maniero, kiun ni ne atendas. Jen maksimuma estetika efiko en skolo, kiu ne akceptas la valoron de imito de modeloj.

En la poemoj nestas aludoj al lia propra vivo, ĉu privata, ĉu publika. Tiu publika vivo re prilaboras historion de (ne nur) okcidenta kulturo, precipe helena kaj latina; foje latinida kaj germanida; malofte mongola, ĉina, japana...; plej karakterize, islanda. Kaj tiu islandeco estas komuna trajto de liaj privateco kaj publikeco.

Tiu islandeco, kiun mi nomus ekskluda, ja elstaras. Tamen alia islandeco, inkluziva, estas la aromo, kiun ni povas flari: tiu de homo, kiu vagas tra la mondo kaj redonas tiun travagatan mondon en formo renovigita.

Ni povus glosi ĉiun poemon abunde kaj redunde pro la multaj aludoj kaj pro la transformoj, kiujn ricevas tiu ekstera mondo, kiam ĝi aperas al niaj oreloj kaj al niaj okuloj post tia metamorfozo, pro kiu ĝi ne plu estas la ekstera mondo, sed nova mondo poezie kreita. Ĉar, ne vane, la etimo de “poezio” signifas “farado”. Kaj kiel ni povus resumi en recenzo tion, kion nia matura poeto faras per siaj vortoj? La verko meritas enciklopedian komenton; nur poste oni povus resumi ideon pri la novaj teritorioj esploritaj en ĉi tiu plia aventuro de nesilentigebla poeto, kies verkaron mi emas nomi “neniam kompletigota”.

Jorge Camacho

Poeto vaste tolerema

Gerrit Berveling: Odoj & aliaj poemoj, VoKo, VoKo-serio nr 23, Zwolle, 2009, 51 p.



Ĉi libreto konsistas el du partoj: *Odoj* (p. 7-25) kaj *Aliaj poemoj* (p. 29-43). Kiel Berveling klarigas sur p. 7, la vorto *odo* malhavas klaran kaj precizan signifon en Esperanto¹. Li mem uzas ĝin por la sama formo uzita de Horacio en siaj *Romaj odoj*, nome por poemoj konsistantaj el strofoj kun ĉi tia senrime metrika aranĝo:

v-v-v-vv-v-
v-v-v-vv-v-
v-v-v-v-v
-vv-vv-v-v

1 Sur p. 57 de BA16 (februaro 2013) A. Melnikov uzis la verbon “odi” kun la signifo “laŭdi”, kio ne multe kongruas kun la vortara aŭ la ĉi-poemara senco de “odo”.